

ALVOKO

AL LA AGO-TAGO EN 2006

Karaj esperantistoj,
antaŭ jam longa tempo oni decidis dediĉi la unuan sabaton de oktobro al la “ago-tago”, tio estas al tago de agado por informi pri Esperanto kaj pri la ideoj de la movado por la internacia lingvo.

Ĉi-jare tiu unua sabato estas la 7-a de oktobro 2006.

Kiel kutime la Estraro de UEA invitas ĉiujn partopreni la ago-tagon je la plej alta agad-nivelo ebla laŭ la lokaj kondiĉoj. Kvankam ĝenerale vi prezentos Esperanton laŭ la normalaj ideoj de nia movado, kie necesos apartan temon, tiu povas esti kunligata kun la rezolucio de la lasta Universala Kongreso en Florenco: “Esperanto kiel rimedo por daŭropova pluvivo de ĉiuj lingvoj kaj de ĉiuj kulturoj”.

Fakte ni volas defendi ĉiujn lingvojn, la naciajn lingvojn grandajn kaj malgrandajn, la malplimultajn lingvojn, kaj de historie ĉeestantaj kaj de enmigrintaj grupoj. Tie kuŝas nia malsameco rilate al tiuj, kiuj nur okupiĝas pri efikeco en komunikado de la supro al la malsupro (internacie kaj ensocie), kaj kiuj ŝovas la pezon de la komprenado kaj la problemojn de lingvolernado al la internacie kaj ensocie malplej fortaj homgrupoj.

Dum la komitataj diskutoj en Florenco estis reprenitaj la konsideroj pri la neceso havi malsamajn ago-tagojn en malsamaj mondopartoj, ĉar oni devas konsideri ĉefe la malsamajn momentojn, en kiuj finiĝas la ferioj kaj rekomenĉigas la laborjaro. Tio estas nun efektiviginda pro la reala tutmondeco de Esperanto. En ĉi tiu transira jaro okazu diskutoj en ĉiuj mondopartoj inter esperantistoj pri la plej bona periodo kaj tago en la koncerna mondoparto kaj ankaŭ okazu apartaj provoj de ago-tago en la elektita periodo. Tiuj kromaj ago-tagoj aldoniĝu al la nun anoncata tago.

Cetere en Eŭropo mem oportunus ligi la ago-tagon al la dato de la 26-a de septembro, Eŭropa Tago de Lingvoj, kiu ne estas malproksima de la unua sabato de oktobro. Ni invitas ĉiujn esperantistojn loĝantaj en la landoj de la Konsilantaro de Eŭropo ligi Esperanton al la jam antaŭviditaj lingvaj eventoj, cetere videblaj en <<http://www.ecml.at/edl/find.asp?s=EV>>, kaj al kiuj oni povas facile kaj libere aldoni tiujn pri Esperanto.

La devizo de la Eŭropa Tago de Lingvoj estas: “Celebri lingvan diversecon, multlingvecon kaj dumvivan lingvolernadon”, sed ilia reta paĝaro pri la tago estas nur en du grandaj lingvoj.

Ni akceptas ilian devizon kaj sincere aplaŭdas je ĝi, sed ni devas komprenigi al ili kaj ĉefe al niaj kuncivitanoj, ke lingva diverseco kaj multlingveco povas flori stabile kaj pluekzisti nur se oni permesos al Esperanto ŝirmi la ceterajn lingvojn. Esperanto povas fari tion, ĉar pro manko de grupo, kiu utiligas ĝin por altrudi apartan kulturon kaj en la fino la superregadon de la anoj de tiu kulturo, ĝi estas la sola internacia lingvo ne-lingvo-vora.

Renato Corsetti, Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio

UK-91

REZOLUCIO DE LA 91-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 91-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Florenco (Italujo) de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2006, kun 2209 partoprenantoj el 62 landoj, konstatinte,

– ke la Jardeko de Edukado por Daŭropova Evoluigo 2005–2014 estas grava kadro por iniciatoj cele al evoluo kiu estu socie dezirinda, ekonomie vivkapabla, kulture taŭga kaj ekologie daŭrigebla;

– ke nuntempe ekzistas gravaj minacoj kaj al biodiverseco kaj al kultura kaj lingva diversecoj, pro la reciproka dependeco inter la homo kaj la naturmedio;

– ke la nuna superrego je monda skalo de unu lingvo havas maltrankviligajn ekonomiajn, sociajn kaj edukajn efikojn koncerne daŭropovecon, lingvan ekologion kaj la rajton je komunikado;

– ke la strebado de la Esperanto-movado al lingva demokratio kongruas kun la valoroj de transnacia edukado celanta informitajn, aktivajn civitanojn, kiuj estu kapablaj kritike kompreni sin mem kaj la ĉirkaŭan mondon por partopreni la evolu procedon responde kaj solidare,



kunsido de UEA-komitato

alvokas la Esperanto-

komunumon aktive engaĝiĝi en la agadoj kiuj, sur diversaj niveloj, strebas antaŭenigi praktikojn koherajn kun la principoj de la bezonata ŝanĝoprocezo, kaj utiligi siajn lingvon kaj retojn serve al tiuj klopodoj;

rekomendas al la Estraro de UEA doni al la ĉi-rilataj problemoj pli da atento en estontaj kongresoj kaj agadoj, partnere kun neesperantistaj organizaĵoj;

konfirmas la pretecon de la Esperanto-komunumo kunlabori kun Unesko kaj aliaj organizaĵoj cele al tutviva edukado por paco, socia justeco kaj kultura diverseco, kaj atentigas ilin pri la lingva aspekto de daŭropova evoluigo.

FRANCOJ PLEJMULTIS EN FLORENCO

Francio retenis ĝis la fino la unuan lokon, kiun ĝi okupis en la statistiko de la Florenca UK ekde la komenco de la aliĝado. Surloke enskribiĝis pli da italaj kongresanoj, sed ne sufiĉe por detronigi Francion for de la pinta loko. Laŭ la defintiva



la Movada Foiro

(42), Kroatio (41), Danio (40), Ĉeĥio (38), Ĉinio (34), Korea Respubliko (32), Serbio (31), Finnlando kaj Israelo (po 29), Bulgario (27) kaj Kanado (22). Al la Florenca UK aliĝis entute 2209 kongresanoj el 62 landoj. Rimarkinda estas la relative granda proporcio de aliĝoj el landoj ekster Eŭropo, entute 494 (22,4%).

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

RUSIANOJ EN UK

Entute al la Florenca UK aliĝis 2209 personoj el 62 landoj, kiel anoncis Gazetaraj Komunikoj de UEA. Rusianoj kun 97 aliĝoj okupis la 6-an lokon post Francio, Italio, Japanio, Germanio kaj Pollando. (Notindas, ke en la listo de 25 “la plej gravaj E-landoj” kun pli ol 20 UK-aliĝintoj, Rusio estas la sola lando en kiu ĝis nun neniam okazis Universala Kongreso de Esperanto.)

Rusianoj estis aktivaj en multaj agadoj de la 91-a UK.

Sur la ĉefa podio pianis Andrej Korobejnikov, ankaŭ kelkaj aliaj artistoj kantis kaj muzikis dum UK-programeroj. Sveta Smetanina rakontis tiel: “Brile koncertis Andreo Korobejnikov, muzika-kompanis la internacian koruson Irina Mironova. Bardan koncerton en la junulara gastejo (ĝin iniciatis MEC) partoprenis Mikaelo Povorin, Nataŝa Berce, Ĵomart kun Nataŝa, rusa bardo (eble, onta esperantisto?) Viktor Tretjakov, por kiu ni tradukis du kantojn kaj invitis speciale al la koncerto”. En la Internacia kon-



tablo de REU dum la Movada Foiro

certo, kiu kronis la artan programon de UK, prezentigis kelkaj rusiaj muzikantoj.

En la Belartaj Konkursoj de UEA la unuan premion pro eseo ricevis Aleksandr Melnikov. Lia filino Helena gajnis la trian premion en la branĉo “Poezio”.

Tre rimarkinda estis la tablo de REU en la Movada Foiro – eksperimenta programero en tiu ĉi UK. Nikolao Gudskov asertis, ke ĝi “estis la plej riĉa enhave kaj vigla en la tuta movada foiro”.

Dum la Solena Inaŭguro Raja Kudrjavceva nome de REU salutis la kongresanojn.

Viktoro Aroloviĉ gajnis la 3-an lokon en UK-kvizo, Garik Kokolija – la 5-an.

Profesoro Anatolij Ŝejpak estis inter la aŭtoroj, kiuj rajtis prezenti siajn librojn dum la aŭtoraj duonhoraj okazintaĵoj en la Kongresa Libroservo.

Sergio Pokrovskij estis unu el la akademianoj, kiu respondis la demandojn de la publiko dum la publika prezento de la Akademio de Esperanto.

Garik Kokolija partoprenis en la laboro de UEA-Komitato kaj tri subkomitatoj, prezentis la novajn librojn de “Impeto” dum la programero “Libroj de la Jaro”, ĉiutage kunlaboris en la kongresa libroservo.

Aleksandr Melnikov, Viktor Kandalinskij, Valentin Seguru, Anna kaj Mati Pentus (kaj verŝajne pluraj aliaj) aktivis en fakaj kunvenoj aŭ faris prelegojn. Renato Corsetti, la prezidanto de UEA, atestis, ke “... sen Aleksandr Melnikov la tago en la universitato de Florenco pri Bruno Migliorini estus estinta tre pli malriĉa”.

(reu-agado)

BUNTAJ KONGRESAJ IMPRESOJ

Antaŭ kvin jaroj mi atentigis en REGo (№ 5 (7), p.12), ke Universalaj Kongresoj tre delonge ne okazis en Italio. Mi ne scias, ĉu tiu mia artikolo iel nerekte kuninfluis, sed efektive jam baldaŭ italaj esperantistoj decidis inviti UK-on en sian landon, en la belegan Florencon – vere trafa estis la elekto de la kongresurbo.

Ĉi-jare por mi ĉiuj faktoroj, de kiuj dependas eventuala UK-partopreno, koincidis tre favore, do post 15-jara paŭzo mi ĝuis la Kongreson freŝpercepte. Plaĉis al mi la salono Zamenhof – grandega pavilono ĉe muro de malnova bastiono, kun du flankaj ekranoj, sur kiuj oni povis pli bone vidi tion, kio okazas sur la podio. Imponis la inaŭgura kaj ferma festparoladoj de Renato Corsetti, en kiuj li, komentante la kongresan em-



urbestra akcepto en antikva palaco



en la koncertoj de Ĵomart kaj Nataša jam aktive partoprenas la filino Karina

blemon, sprite komparis esperantistojn kun la biblia Davido, kuraĝe luktanta kontraŭ Goljato – la nuna maljusta lingva ordo en la mondo. Bone impresis Interkona Vespero kun Movada Foiro, en kiu la tablo de REU okupis rimarkeblan lokon.

Mi vidis du teatraĵojn, kiuj postlasis tute kontraŭajn impresojn. La spektaklo “Pacaj batalantoj” fare de la brita trupo “Verda Ranaro” estis fascina, ĝi tuŝis tre aktualajn demandojn pri rolo de Esperanto en la makroso-

cio kaj pri diversaj komprenoj de tiu rolo fare de apartaj esperantistoj. Sed la spektaklo “Stil-Ekzercoj” fare de unuopa aktoro estis ne pli ol klaŭnaĵo.

Mi ne trovis kunvenon pri mia fako, matematiko, tamen mi vizitis du fakkunvenojn, proksimajn al mi vivkoncepte. La kunvenoj de Ateista Tutmonda E-Organizo kaj de Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj pasis laŭ similaj scenaroj: komence la gvidantoj raportis pri administraj aferoj (kotizoj, asocia organo ks); poste asociaj aktivuloj prilumis la ĝeneralan situacion en la mondo kaj en apartaj landoj – temis respektive pri la problemo de deviga religia instruado fare de pastroj en publikaj lernejoj kaj pri defendo de la sana vivmaniero kontraŭ tabakaj firmaoj kaj ties subtenantoj, la fumantoj. En ambaŭ kunvenoj sekvis viglaj opini-interŝanĝoj, sed mi ne aŭdis klarajn ideojn pri la lokoj de la menciitaj esperantistaj asocioj en la kontraŭobskurantisma kaj kontraŭtabaka frontoj.

Vera bonŝanco por mi estis partopreno en la kongresa kvizo kaj la gajnita tie 3-a loko. Plej malfacile estis trafi la startan konsiston el 9 ludantoj, ĉar la gvidanto proponis demandojn al plurdekopa publiko, kaj vican startan lokon okupis tiu, kiu elkriis la respondon pli rapide kaj pli laŭte ol aliaj (mi kutimiĝis al malpli tumulta maniero, praktikata en la rusia intelektluda mondo: oni ne superkrias unu la alian, sed levas la manojn, kaj la gvidanto petas respondi nur tiun, kiu plej frue levis la manon). Al tiama-niere selektitaj ludantoj estis proponitaj diversspecaj demandoj. Komence estis faktologiaj, primovadaj demandoj, kiujn mi bone sciis, kaj tial ioman tempon mi havis plej multe da poentoj. Sed



la kvizo

en la finala parto, kiam restis nur tri ludantoj kun proksimume egalaj poentokvantoj, ekdominis enigmoj kaj vortludoj, en kiuj multe pli bone orientiĝis Tatjana Aŭderskaja – rezulte ŝi ricevis la 2-an lokon. Kaj venkis István Ertl, ekvilibre forta pri ambaŭ demandospecoj. Dum enmanigo de la premio mi estis prezentita kiel “konata en Rusio kvizisto” (mi citas laŭmemore), aŭdi tion estis tre agrable.

La Kongreso estis bonega observejo por tiuj, kiuj interesiĝas pri elparolo de E-vortoj fare de parolantoj de diversaj naciaj lingvoj. Pri tio ekzistas diversaj opinioj: iuj asertas, ke la influo de la gepatra lingvo estas neekstermebla kaj neeviteble provokas prononc-deviojn; aliaj oponas, ke ĉe persista trejniĝo tamen oni povas atingi internacie norman prononcon, ne ebligantan identigi la gepatran lingvon de la parolanto. En UK mi vidis (pli ĝuste, aŭdis) konfirmojn por ambaŭ vidpunktoj. Kadre de la diskuto pri la Kongresa Temo raportis reprezentanto de Hindio; tion eblus konjekti laŭ lia aspekto kaj laŭ la parol-enhavo, sed ne laŭ la prononco, tute sama, kian oni povas aŭdi en E-elsendoj de Pola Radio. Sed dum la prezento de la sekva UK japanaj samideanoj proponis rigardi Jokohamon sur “birdoj” (= bildoj) kaj mapon kun kongresaj objektoj, signitaj per “belga” (=verda) koloro. Aŭskulti tion, konstante solvante similajn mikroenigmojn, estis lacige. En Internacia Arta Vespere kuba kantisto prezentis kanton kun plurfoje ripetitaj vortoj “tiel la mondo iras”, tamen la lasta vorto persiste sonis kiel “idas”. Do, ĉu “tiel la mondo idas”? Kiel esperantisto, mi ne aprobus la mondon, en kiu *la junaj italaj esperantistoj organizis dum UK apartan junularan programon, jen ekz. koncertis “Dolchamar”* vis de mi nur ĝentilan minimumon da aplaŭdoj.



Sed tute ne aplaŭdis mi al muzika grupo, kiu samvespere kiel objekton de siaj “modernigaj” ekzercoj elektis ...la E-himnon. La plej karan por ĉiu vera esperantisto kanton tiuj ...oj (la leganto kompletigu la vorton laŭplaĉe) profanis, kripligante la melodion kaj akompanante la plenumon per hurloj kaj vulgaj movoj de koksoj kaj aliaj korpopartoj. Alvorte: per kiuj korpopartoj pensis kompilintoj de la programo, enigante ĉi tiun aĉaĵon? (Se mi aŭdus tion antaŭ dudeko da jaroj, mi reagus per plej forta fajfado. Sed laŭ la nuna stulta modo fajfi signifas aprobegi, do al mi restas nur esperi, ke iu el sekvantoj de tiu modo aŭdus klarigi al mi, kiel laŭ ĝi oni esprimas malaprobon.)

Oftis krokodilado – kaj en la kongresejaj kuluaroj, kaj precipe en la apuda herbejo. Ĉiupaŝe mi renkontis grupetojn de samnaciaj kongresanoj, senĝene interparolantaj nacilingve. Vere, plejmulton da alilandaj kongresanoj mi ne konis persone kaj ne povis juĝi, ĉu la renkontitoj estis realaj esperantistoj, ĉu eternaj komen-

cantoj aŭ eĉ simple hazarduloj, por kiuj UK estis ne pli ol oportuna maniero viziti la turisme allogan Florencon (pri ekzisto de la lasta kategorio mi povas supozi, ĉar tiaj kongresanoj estis ankaŭ en nia karavano, organizita de Moskva E-Centro). Sed mi ja aŭdis ankaŭ rusan krokodiladon fare de tre konataj voĉoj...

Tamen: diablo kun tiuj memsufiĉaj krokodilaj grupetoj, ili estis finfine marginata flanko de la Kongreso; ĉu mi renkontis ilin, ĉu ne renkontis – kia diferenco? Ja nekompareble pli gravis tio, ke kunkongresis pluraj miaj malnovaj geamikoj, inkluzive eksajn samlandanojn. Estis ĝojege renkonti ilin, estis agrable konversacii kun ili. Ni rememoris la junajn jarojn, interparolis pri la nuna vivo, kaj certe ni ne krokodilis!

Universala Kongreso estis impona, ĉar la feston de la monda esperantistaro ne povis difekti la menciitaj (ankaŭ ne menciitaj) mankoj, nek la suferiga varmego. La partoprenon en la pinta evento de la jaro kaj la neforgeseblan busvojaĝon al ĝi (kies programo inkluzivis i.a. viziton al la tombo de Zamenhof en Varsovio kaj ekskursojn kun E-ĉiĉeronoj en kvar urboj de Germanio) mi, samkiel ankoraŭ pli ol kvardeko da kongresanoj, ŝuldas al Moskva E-Centro. Grandan organizan laboron antaŭ kaj dum nia grupvojaĝo faris Svetlana Smetanina kaj Mikaelo Ĉertilov. Dankegojn al ili!



*agrabla surprizo de la Internacia vespero
estis elpaŝo de Ĝanfranko Molle*

Viktor Aroloviĉ (Moskvo)

BLINDULA KONGRESO EN FLORENCO

Ĉi-jare la 72-a IKBE (Internacia kongreso de blindaj esperantistoj) okazis la 29-an de julio – la 5-an de aŭgusto en Florenco kaj estis plene integrita en UK. Programo de la blindula kongreso praktike estis la sama kiel tiu de la ĝenerala kongreso. La blindulan kongreson partoprenis 160 esperantistoj (inkluzive akompanantojn) el 25 landoj.

(esper-inform)

INFANA KONGRESETO

La 37-a Internacia Infana Kongreseto ĉi-jare okazis samtempe kun UK en Florenco (la 29-an de julio – la 5-an de aŭgusto) en la urbo Prato (20 kilometrojn norde de Florenco). Necesas mencii, ke ĉi-jare infana kongreseto fariĝis 50-jara, ĉar la 1-a IIK okazis en Kopenhago en 1956 kune kun la 41-a UK. Ĉi-jaran kongreseton partoprenis 36 6-13-jaraj infanoj el 21 landoj kaj 9 gvidantoj el 8 landoj. Ĉefaj gvidantoj de la kongreseto estis Bert Schuman (Francio) kaj Leonardo Pampaloni (Italio).

(esper-inform)

Rusiaj E-tagoj apud Volĵskij bonorde pasis de la 12-a ĝis la 19-a de aŭgusto.

La bazejo, kiun la volgogradaj organizantoj trovis preskaŭ lastmomente, estis ege agrabla kaj tre oportuna por malgranda aranĝo. La rivero Aĥtuba prezentis mirinde bonan naĝejon. La sola malavantaĝo estis la larĝeco de la rivera plaĝo – oni devis unue travadi 500 metrojn da varmega sablo. Sed la akvo mem estis super ajnaj laŭdoj – sufiĉe profunda, pura kaj malvarma.

La vetero, kiel tiutempe ĉie en la Suda Rusio, estis varmega – ĉ. 32-35 gradoj ĉiutage, sed se oni konvene (mal)vestiĝis, tio ne ĝenis.

Nun pri malpli fanfaronindaj ciferoj: la partoprenantaro. Entute aliĝis 23 personoj, ankoraŭ kelkaj partoprenis, sed ne registriĝis. Ĉar ne estas multaj, mi povas simple listigi: Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin), Tatjana Malej (Ivanovo), Valentin Melnikov, Irina Mironova,

Georgij Kokolija, Dmitrij Ŝevĉenko (Moskvo), Valentina Sibirceva (Lipecka reg.), Evgenij Demĉenko, Andrej Nikolajev (Brjansk), Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk), Tatjana Vtorova, Dmitrij Vronskij, Ludmila Bikova, Vera Dumler, Valentina Spicina, Saulja Tikejeva kaj kelkaj aliaj (Volgograd), Aleksandr Morev (Sankt-Peterburg), Vladimir Minin (Tomsk – de-



la komuna foto de RET-06

nove!), Helena Melnikova (Rostov-Don), Andrej Grigorjevskij, Natalja Grigorjevskaja, Saša Grigorjevskij (Ŝumerlja), Gleb Artamonov (Smolensk).

Kompreneble, en tia kompanio oni ne bezonis krokodili – kaj ne krokodilis.

La programo estis tre malstreĉa – kun longaj periodoj dediĉitaj al naĝado kaj ripozado. La programo de ĉiu tago estis anticipe kunkreata de ĉiuj dezirantoj, el kiuj plej aktivis Galina Terentjeva, Valentin Melnikov, Tatjana Vtorova, Irina Mironova, Dmitrij Ŝevĉenko, Vladimir Minin. Plej multajn programerojn prizorgis Valentin Melnikov: intelektajn ludojn, kvizojn ks. Okazis ankaŭ kelkaj diskutoj kaj prelegoj pri la kluba temo.

Enkadre de RET okazis la vica Konferenco de REU, en kiu partoprenis 15 delegitoj. La Decidojn de la Konferenco vi povas legi en la ĉi-numera “Bulteno de REU”.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

REZULTOJ DE OkSEJT-46

En OkSEJT-46 estis ege bonaj:

– la vetero, naĝado, akvometonoj, muzikaj programoj (Mikaelo Bronŝtejn, Helena Melnikova, Nina Djomuŝkina, Aleksandr Ĥrustalĵov) kaj multaj aliaj aferoj.

Laŭdindas la lokaj organizantoj, kiuj trovis tre taŭgan bazejon, bonan E-parolantan kuirston kaj provis esti inventemaj pri la programo.

Pli malbonis la nivelo de la kursoj, kvanto de programeroj kaj “lingva disciplino” (kiu fakte ne ekzistis kaj ne estis postulata).

Entute partoprenis ĉ. 70 personoj, el kiuj 65 registriĝis kaj eniris la tendaran adresaron. La plej grandaj grupoj venis de Volgograd, Moskvo, Jekaterinburg kaj Tjumenj. La nombro de inoj signife superis tiun de la mal-inoj (41 kaj 24). La averaĝa aĝo proksimis al 28 jaroj.

En la tendaro okazis plurkunsida junulara kunveno, dum kiu oni provis formi novan agadstrategion kaj kunordigan teamon de REJM. El tio, helpe de Irina Gonĉarova, Vitalik Malenko kaj Aleksej Besĉastnov, rezultiĝis “iniciata grupo” el diversurbaj junaj e-istoj, kiu intencas daŭrigi la komunikadon ankaŭ post la tendaro. Pluraj membroj de la grupo



la komuna foto de OkSEJT-46

estas komencantoj, ankoraŭ studentaj la lingvon, tial la labora lingvo estas la rusa.

Pri la sekvajara OkSEJT oni parolis, sed nur rilate la koncepton kaj la programon. Iaj konkretaj proponoj pri la loko kaj la organiza teamo ankoraŭ mankas.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

IMPRESOJ PRI OkSEJT

Jam dum kelkaj jaroj mi lernas Esperanton kaj vizitis jam kelkajn E-renkontiĝojn. Sed mi ĉiam deziras scii, kio instigas esperantistojn veni el malproksimaj anguloj de nia lando al E-aranĝoj. Ĉu por ili ne sufiĉas komunikado en kluboj, korespondado aŭ interreta babilado?

Ne, tio estas nur anstataŭaĵo kaj aldono. Unu afero gravas nur – viva homa interparolo kaj amika buŝa babilado. Jes, por renkontiĝi kun amikoj venas homoj, por konatiĝi kun aliaj, por vidi per propraj okuloj, ke ili ne estas solaj en granda urbo



la volgogradaj ĉeforganizantinoj de OkSEJT-46

aŭ malgranda vilaĝo.

Ĉi-jara OkSEJT montris tion: homoj aktivaj, interesaj volas iri antaŭen, ili ne plu volas resti solaj, disigitaj. Jes, mi rakontas pri REJM, pri la plej grava junulara E-organizo en Rusio, kie ĉiuj povas trovi por si mem okupon, per kiu ili povas montri, ke per Esperanto ili faros pli multe ol sen ĝi.

Malgraŭ tio, ke dum du lastaj jaroj REJM preskaŭ ne funkciis, venis kaj

aperis novuloj, kiuj volas kune atingi celojn, kiujn oni mem elektis: informado pri Esperanto, instruado, kluba laboro, eksteraj rilatoj kaj varbado k.t.p. Nun necesas helpo kaj subteno de spertuloj, kiuj scias, kion ne indas fari por ne perdi la tempon. Do, aliĝu tiuj, kiuj ne indiferas.

Ĉio ĉi ne aperus, se ne ekzistus OkSEJT. La agordita organiza teamo faris preskaŭ ĉion, kion ĝi povis fari per propraj fortoj.

La trovita bazejo estis granda kaj bona. Civitanoj de OkSEJT oportune enloĝiĝis en lignaj dometoj kaj tendoj. La manĝoj bongustis. Aparte mi devas rakonti pri akvomelonoj. Dum la unuaj tagoj ni atendis promesitajn akvomelonojn kaj eĉ komencis plendi pri ilia manko. Sed poste aperis amaso da tiuj beroj, estis eĉ programero, dediĉita al akvomelonoj: akvomelona evolucio (Montru al mi tiun homon, kiu nomis akvomelonojn beroj!). Kaj nun mi eĉ pensi ne povas pri ili.

La kuiristo estis devigita paroli en Esperanto. Nun vi povas imagi, kiel Esperanto influas al simplaj homoj!



Helena Melnikova

La programo estis malstreĉa, kaj la homoj devis igi sin partopreni iun interesan programeron, ĉar la vetero estis varmega kaj plaĝo proksimis.

Ĉu OkSEJT devas esti instrua? Pri tio ankaŭ pensis REJM-kunsidantoj. En la tendaro kursoj okazis eĉ kvarnivelaj: por startuloj, komencantoj, daŭrigantoj kaj perfektigantoj. Sed ĉu sukcesaj? Laŭ mia opinio, ne. Tendaro devas resti parte instrua, sed instrui la lingvon necesas ne



la rivero Aĥtuba ege helpis ne tro suferi pro la varmo

per kutimaj kursoj, sed per aliaj metodoj.

Lerni gramatikon kaj bazan vortaron oni povas eĉ entrajne survoje al la tendaro, sed en la tendaro oni instruu kolore, nekutime, per praktiko, per ludoj k.s.

Dum la tuta tendaro regis amika etoso.

Koncertis ĉi-foje Mikaelo Bronŝtejn, Helena Melnikova, Nina Djomuŝkina kaj neoficiale – Aleksandr Ĥrustaljov,

kies belaj voĉoj ĉiam kolektadis la tendaranojn vespere kaj eĉ ne nur esperantistojn, aliaj ripozantoj ankaŭ ĝuis la kantadon.

Oni kantis ne nur vespere, sed ankaŭ tage, kiam okazadis instruado de kantoj far Nina Djomuŝkina kaj Mikaelo Bronŝtejn.

Ĉiamaj ludoj ĉe rivero Aĥtuba donis al talentuloj, kaj ne nur al ili, tempon por korpa arto kaj konstruo de sablaj kasteloj.

Ĉi-foje OkSEJT estis bona, sed estas laŭ niaj fortoj fari ĝin pli multnombra, pli kvalita. Do, se vi havas eblecon subteni REJM-aktivulojn per konsiloj, proponoj k.s., faru tion!

Ĉar ekzistas ora regulo: Ju pli multe vi donas, des pli multe vi ricevos.

Aleksandr Osincev (Jekaterinburg)

VARMA LOKO, VARMA KOMPANIO...

Enkonduke. Ne ĉiujare mi havas eblon partopreni enlandajn somerajn amasiĝojn de esperantistoj malgraŭ firma konscio, ke la etoso de la amasiĝoj ĉiam estas



utila por mi mem, unuavice. La etoso inspiras emon fari ion por la ĉarmaj homoj. La ĉarmaj homoj rakontas ion novan, nas-kantan en mia kapo svagajn ideojn. La ideoj en la kapo maturiĝas de tago al tago, varmigataj de la malavara somera suno. La somera suno... Unufraze: nepartopreno ĉiam estas dolora kaj bedaŭrinda por mi. Do ĉi-jare mi ne havas la kaŭzon por tiu doloro kaj tiu bedaŭro, ĉar mi partoprenis du tagojn de RET kaj tri tagojn de OkSEJT.

Ĝenerale. Ambaŭ amasiĝoj okazis en



amikema erinaco, kiu apenaŭ posedis E-on

– de interne, do la vivo estis absolute tolerebla. Ankaŭ ĉiuj noktoj estis senpluvaj kun refreŝiga reduktiĝo de l' varmo, kun stelplena suda ĉielo, cikadaj korusoj kaj amikemaj erinacoj, vagantaj inter la dometaro. La erinacoj apenaŭ posedis esperanton. Ankaŭ la cikadoj.

RET. Tre ripoziga amasiĝo de gekonatoj multjaraj, longe ne viditaj kaj, plejparte, videndaj. “Estis eĉ pli ripoziga kaj trankvila ĝis via alveno” – diris certa persono, sed mi ne imagas ion pli ripozigan – nur se ŝli dormis dum tiuj antaŭaj tagoj. Rakontoj pri Usono far du usonanoj (mi, la portempa, kaj Vladimir Minin, la porlongtempa) ne malpacigis la duopon malgraŭ kelkaj diferencoj pri detalaĵoj kaj venigis al ĉebilarda konkurado, tre agrabla. Nokta poezia vespero apud lignofajro estis tute taŭga por entuziasmigi la ĉeestantajn REU-membrojn, suflori al ili aferecajn opiniojn kaj sugesti rezignon (aŭ preskaŭ rezignon) pri stultaj paroloj dum la sekvataga Kunveno. Oni eĉ nomu ĝin Konferenco ĉe forta imagipovo, sed mi ne posedas tiun. Dek kvin reprezentantoj de kelkaj kluboj – jes, raciplenaj, kapablaj kolektive priparoli/pripoluri interesajn, eble eĉ taŭgajn solvojn de la problemegoj, kiujn REU alfrontas nun, – laŭ mi ne nomu sin decidorgano. Tamen, la Kunveno (pardonu, Konferenco) pasis tre vigle, atentokapte kaj eĉ gaje. Evidentiĝis, ke Rusia Esperantista Unio estas funkcia malgraŭ kelkies duboj pri tiu fakto. Cetere, plia progreso de la funkciado dependas de ni, REU-membroj, do ĝi estas nepre okazonta, se ĉiu faros ion por la movado krom pago de aliĝkotizo.

SEJT. Sabate la gekona-

loko varma kaj kortuŝe animiga, spite al la nomo, kiu estas ne Verda, sed “Ruĝa Ĝardeno”. Cetere, mankas tie io ruĝa (krom tomatoj kaj sabatvesperaj vizaĝoj de aborigenoj), sed verdaĵoj abundas, do, almenaŭ por la espa periodo, eblus neglekti la sovetaĵon nepruvitan, kaj nomi la Ĝardenon laŭmerite – Verda. Ĉiuj tagoj de mia restado estis senpluvaj kun pli ol 35-grada varmo. Sed rapida fluo de la rivero Aĥtuba (akcentu ĉe la unua vokalo) konvene malvarmigis la korpon de ekstere, kaj dolĉaj, sukoplenaj akvomelonoj



la familio de Grigorjevskij

toj plejparte fuĝis. Anstataŭ ili alvenis kompanio pli amasa, pli gaja, oble pli juna, bone posedanta nek esperanton, nek certajn planojn pri eventuala tempopasigo. Sed treege ĉarma, se ni aludu junulinan plimulton, kaj treege lerta, se ni parolu pri junul-areto. Por mi plej gravis, ke preskaŭ neniun el la gevenintoj mi konis antaŭe. Do okazis tre-tre agrablaj konatiĝoj. Kun la esperantema Saŝa, la kuirema Ilja, la helpema Oleg, la fajrosvingema



Nina Djomuškina

Kurt. Kun la ravaj, admirindaj kaj amindaj Galja, Julja, Katja, Kristina, Ksjuŝa, Marina, Olja, Saulja, Vika!!! Forĵetendus almenaŭ dudek kvin jaroj, eble eĉ tridek por komforta komunikiĝo, sed, ve! – mankas Mefistoj inter esperantistoj...

Mi ne diru, ke tute mankis antaŭpreparita programo. Volgogradaj junulinoj lerte inventis, ke ĉiu tago de SEJT havu sian koloron de ĉielarko, ke estu kvar grupoj: suno, luno, steloj kaj mi ne memoras kio (*duonsuno* – *G.Kokolija*). Mankis ordo kaj konvene rigora, postulema organizanto. Garik (nu, vi konas lin) diris al mi: “Ne maltrankvilu, venos Krasnokutskij, kaj kun li la ordo”. Krasnokutskij venis, la ordo – ne. Sed venis por du aŭ tri tagoj Vitalik Malenko, pro kiu tuj okazis apero de necesejpapero. Krom tio Vitalik ordonis al la gvida knabinaro kunvenigi ĉiujn REJM-anojn. Ĉiuj gejunuloj pli-malpli obeeme eksidis en rondo kunvena. La vizaĝesprimoj elokvente montris, ke ili konscias sin REJM-anoj same, kiel anoj de la “Unio de glavo kaj plugilo”, kiam ĝi estis proklamita de la glora Ostap Bender. “Mi donos al vi “parabellum” por ke vi protektu mian foriron el REJM!” – ah, pardonu, tion diris ne Vitalik, sed la sama Ostap. Tamen ektimo de la aŭskultantoj estis simila. Nu, iel-tiel venis la komprenemo, kaj fondiĝis iniciata REJM-grupo. Jen tio estas plej grava kaj esperiga atingo! Krom ĝi ne mankis en la programo realigita: koncertoj, nokta naĝado, iom da E-instruado, fajrosvingado, ventrodancado kaj hokettrikado, do la homoj havis ion por fari. Ĉio ĉi estis eĉ pli ripoziga ol RET, kaj mi sincere bedaŭris, forlasante tiun ripozon kekajn tagojn antaŭ la oficiala fermo.

Grumblete. Por vojaĝo al RET-SEJT mi elspezis monatan salajron, sed eĉ ombreto de bedaŭro ne aperas en mia animo. Ĉar mi ricevis mian ripozon – similan mi havis, verŝajne, antaŭ dek kvin jaroj. Ja jes, mi uzis kupeon, sed la elspezoj



Dima Ŝevĉenko

de aliaj venintoj ne tro diferencas de la miaj. Do kelkaj el ili laŭtvoĉe esprimis dubon: ĉu indas fari tian elspezon por veni al similaj amasiĝoj? Diference de mi ili venis por ricevi esperanton kun/en interesa programo. Ili malgajnis. Kion do ni faru en futuro por ke homoj venu al similaj amasiĝoj pli grandkvante kaj neniom bedaŭru pri sia elekto? Estas multaj aferoj pripensindaj kaj solvindaj, mi elektu inter ili nur du, ne malplej gravajn:

1. La ideo pri sinsekvaj RET kaj SEJT laŭ mi estas pravigebla kaj utila ĉe unu kondiĉo: la spertuloj-RETuloj venigu siaurbajn komencantojn al apud-RET-a instrua amasiĝo; ekzistas eĉ bone forgesita nomo por ĝi – Paroliga Periodo. Tiel la komencantoj atingos la SEJT-periodon jam kiel amikiĝinta kaj funkcia teamaro.

2. Estas misa vojo, ke pri la programo de SEJT okupiĝas nur loka organiza grupo. En REU-REJM devas esti estrarano aŭ komisiito, kun konstanta tasko kunordigi la programojn de amasaj aranĝoj. Tiu persono, kunlaborante kun la tuta Estraro kaj aliaj dezirantoj, havos jaron por konstrui vere bonan programon almenaŭ por RET-SEJT. La programon, kie ĉiu minuto estos interesa. La programon, kiun ricevinte, multaj geuloj, jam planintaj esperantumi eksterlande, skrapos la nukon mediteme.

Konklude. En la frua mateno de mia foriro brakumis min miaj novaj konatoj, kisis min miaj novaj konatinoj, kaj ĉiu el ili diris: “Ni volas denove renkontiĝi kun vi. Ĉu eblas?” Kortuŝa kaj agrabla por mi estis tiu dirado, kaj mi respondis al ĉiu: “Lernu esperanton. En Esperantujo ni renkontiĝos senprobleme.” Mi esperas, ke tio okazos.



inoj en OkSEJT plimultis ol malinoj

Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin)

LA GEJUNULOJ REVIGLIĜAS

Ĉi somere de la 19-a ĝis la 26-a de aŭgusto en la ripoza bazejo “Ruĝa ĝardeno” apud Volgograd pasis rimarkinda aranĝo – OkSEJT-46. La aranĝon partoprenis 65 personoj. Ni ne eraros dirante, ke tiu ĉi tutrusia tendaro memoras pli bonan tempon.

Memkompreneble en la tendaro aperis la intenco ŝanĝi kaj OkSEJT-on, kaj entute junularan E-movadon en Rusio. La komenco estu reviviĝo de REJM, nia Esperantista Junulara Movado, kiu plu ne montras simptomojn de vivo. Por tio kuniĝis iniciatema teamo el 8 homoj, kiuj kuraĝis respondi pri estonta REJM. Estis elektitaj 6 prioritataj direktoj:

Informado, pri kiu respondecas Nataŝa Ĵuravljova (Ivanovo);

Kulturo – Dmitrij Nikonov (“Kurt Mark Forte”, Moskvo);

Aranĝoj – Aleksandra Loseva (“Sorĉa”, Moskvo);

Kluboj – Saulja Tikejeva (Volgogrado);

Eksteraj rilatoj – Aleksandr Osincev (Jekaterinburg);

Instruado – la respondeculo estas serĉata.

Ĉion kunordigas Olĝa Talanceva (“Reganta Mondon”, Moskvo).

Laborante dum OkSEJT, la iniciatema teamo pridiskutis kelkajn demandojn, gravajn por revivigo de REJM kaj por tutrusia junulara E-movado. Jen estas konvenciaj decidoj, kiuj estos la programo de nia agado:

1. *Kia laŭ nia opinio devas esti junulara E-organizo, kaj kiujn taskojn ĝi plenumas?*

REJM devas popularigi ideojn de Esperanto, homoj devas scii kio estas Esperanto kaj poste ili decidu kiel rilati al ĝi. Kaj certe REJM povas kolorigi la vivon de REJM-anoj, por ke ĝi estu interesa, brila kaj plena de ĝojo.

2. *La sekva demando estas pri strukturo de REJM.*

Ni elektis 6 prioritatajn direktojn:

Informado – por popularigi Esperanton kaj plisimpligi komunikadon ene de Movado. **Kulturo** – Esperanto estas E-kulturo, E-historio, kaj krome – libera kreado de junularo. Tio estas nia arta, nia interesa vivo. **Aranĝoj** – niaj grandaj kaj malgrandaj aranĝoj, renkontiĝoj de geamikoj kaj samideanoj.



la junularo pidiskutas estonton de REJM

Ili povas multiĝi kaj iĝi pli kaj pli interesaj. **Instruado** – certe ni ne povas forgesi E-instruadon. **Kluboj** – ni intencas revivigi integrecon de E-kluboj en la tuta Rusio. **Eksteraj rilatoj** – ni ne volas komunikiĝi nur ene de nia negranda rondo, ni volas allogi la aliajn al niaj ideoj, proponi niajn ideojn kiel eblajn solvojn de iaj problemoj.

3. *Kiaj estos niaj plej proksimaj agoj ?*

Ni intencas krei REJM-paĝaron kiel laboran rimedon, respegulantan la vivon de E-junularo kaj helpantan ĝin. Kaj ŝanĝi la koncepton de OkSEJT.

Ni alvokas ĉiujn junajn esperantistojn partopreni nian iniciaton kaj sendi siajn proponojn. Kune ni povas plibonigi nian vivon!

P.S. Sendu viajn proponojn al Olĝa Talanceva <reganta@rambler.ru> aŭ Nataŝa Ĵuravljova <zu86@mail.ru>.

La iniciatema teamo

Valeria

Mia unua vizito Leningradon okazis en 1964. Tiutempe mi jam posedis esperanton kaj sciis de mia Instruisto, ke la movado en Leningrado estas apoganta sin je du personoj: Semjon Podkaminer kaj Barbara Cvetkova. Fakte, tiun duopon konis la tuta mondo esperantista. La geprudentuloj foje kontraŭstaris unu la alian, ĉar ambaŭ havis fortajn karakterojn, sed ilia kontraŭstaro ĉiam estis kreiva kaj finiĝis per la solvo plej racia. Barbara, la panjo Barbara, humile sed insiste moderegis la opiniojn de Semjon Naumoviĉ, ofte tro rigorajn. Efektive ŝi estis kerna elemento de la esperantista vivo en la dua ĉefurbo dum multaj jardekoj. Estante profesia pentristo, ŝi senlace produktadis instruilojn, afiŝojn, ŝercajn murgazetojn. Ŝi estis unu el nemultaj, kiuj kuraĝis kontakti eksterlandajn esperantistojn, ofte vizitantajn Leningradon ene de laikaj turistaj grupoj. En la klubo ŝi aktivigis pigrulojn, admonis kabeintojn kaj baptadis novicojn. Ŝi estis neanstataŭebla.

Do, la sorto verdiktis al Valeria ĉiam resti en la ombro de sia brava panjo, tamen la filino havis sian vojon.

Valeria Cvetkova, naskita en 1936, knabinaĝe renkontis la plej danĝeran elprovon de sia vivo – la Mondmiliton kaj la sieĝon, aŭ la blokado de Leningrado. Ŝi travivis kun la panjo kaj kun la urbo



Valeria Cvetkova kun Biruta Rozenfelde dum UK en Florenco

ĉiun tagon el tiuj naŭcent blokadoj – ĉe la foresto de nutraĵoj kaj komfortaĵoj, en la konstanta ĉeesto de obusoj kaj bomboj. Barbara laboris (kelkaj ŝiaj dummilitaj afiŝoj venkokredaj eniris la Enciklopedion de la dummilitaj afiŝoj), Valeria vizitadis infanvartejon – unusolan, restintan en la sieĝita urbo. Ambaŭ sukcesis elvivi.

La eksteresperanta postmilita biografio de Valeria estas tute simpla: lernejo, kulturinstituto, tiam havanta la nomon de Krupskaja, tri jaroj da laboro en lernejo kaj tridek tri – en la ĉefa leningrada ŝtata biblioteko nome de Saltikov-Ŝĉedrin, la famega “Publiĉka”.

Sed estis ankaŭ Esperanto! En 1956, dum preparado de la sesa Monda Festivalo de junularo, kun registara permeso estis fonditaj du junularaj Esperanto-grupoj: “Fajrero” en Moskvo kaj “Aŭroro” en Leningrado. Valeria iĝis tiom kerna persono en “Aŭroro”, ke eksterlandanoj venantaj en la urbon nomis ŝin ne Valeria, sed Aŭroro! Ŝi aktive partoprenis diversajn esperantistajn aranĝojn ekde la unuaj BET-

oj. Ŝi instruis la lingvon kaj prelegadis pri ĝi en la plej imponaj ejoj de la urbo, ekzemple, en la centra prelegejo de la societo “Scio” en Litejnij-avenuo. Ŝia juna ardo entuziasmigis multajn tiutempajn projektojn: esperantistajn vesperojn, publikajn aranĝojn ktp. Ie en la epoko, kiam eĉ mencio de l’ vorto “Esperanto” en amaskomunikiloj estis preskaŭ malpermesata, Valeria kunaŭtore kun barnaulano Gennadij Jaskov sukcesis aperigi la esplorartikolon “Esperanto en radio dum 20-30-aj jaroj”.

Sed la ĉefverko de Valeria estis farita ie en sepdekaj jaroj. Tiam ŝi lanĉis kompiladon de bibliografio de literaturo en kaj pri Esperanto, ricevebla per t.n. MBA (Interbiblioteka abonemento) el ĉiuj bibliotekoj de Sovetunio. Ŝian alvokon subtenis esperantistoj en multaj urboj, do estis faritaj ŝvitaj esploroj en diversaj bibliotekoj. Rezulte Valeria akumulis riĉegan materialon, kiun eldonis libroforme Dimitrij Cibulevskij en Ĥarkovo. Certe, post tridek jaroj, kiam la menciitaj bibliotekoj trafis diverslanden kaj mankas certeco pri bona konservo de la libroj, tiu laboraĵo ŝajnas malaktualiĝinta. Tamen ĝi estas bona ekzemplo: ĉu malbonus nun havi enrete informilon pri E-libroj, atingeblaj en diversurbaj bibliotekoj almenaŭ en Rusio?!

Sian jubileon Valeria Cvetkova renkontas en vigla kaj bonhumora agado poresperanta, nu, eble ne tiom vigla, kia ĝi estis antaŭ kvardek jaroj, sed ĉu ne pli okulfrapa estas malvigliĝo en la agado de multe pli junaj samideanoj?

Kara Valeria, sanu kaj bonfartu! Viaj geamikoj tra la tuta mondo gratulas vin!

Ne estingiĝas la esper’

En ŝlimo de l’ movad’ senmova,

Dum vi funkcias sur la Ter’.

Hura, Valeria Cvetkova!!!

Mikaelo Bronŝtejn (Tihvin), komisiito de la popolo

INTERNACIA SOMERA LERNEJO EN ARMENIO

02-09.07.2006

Erevana neforgesebla somernokto. La kafejo sub libera ĉielo apud la Respublika placo. Esperanta parolado, ŝercoj kaj gaja rido, bondeziroj kaj adiaŭaj vortoj... Tio estis la lasta komuna aranĝo de la Somera Lernejo – Adiaŭa vespero, kaj la lasta eblo por senpere interŝanĝi impresojn pri la Lernejaj tagoj, dividi ideojn kaj sentojn, fari planojn por la estonto.

La semajno pasis tre rapide, kvazaŭ tio estis hieraŭ, kiam frumatene, la



2-an de julio, la partoprenantoj de la Internacia Somera Lernejo enbusiĝis kaj direktis sin al la montara perlo de Armenio – la lago Sevan. Ĉe la bordo de la lago, kie belaj aromaj abioj kaj pinoj karesis la okulojn kaj ĝojigis la animojn, pasis la interkona tago, dum kiu ĉirkaŭ 40 esperantistoj el kvar landoj piknikis, interamikiĝis, kune kantis kaj dancis. Ĉi tie okazis ankaŭ la enkonduka prelego de Prezidanto de ILEI Radojica Petrović, kiu afable konsentis gvidi la instrumentodikan seminarion dum ISLA-2006 kaj prezenti la projekton “Interkulturo”.

La Lernejo daurigis sian laboron en Dilijan, la fama kuracloko en montara Armenio, kien veturis pli malgranda grupo el 25 personoj: 11 esperantistoj el Irano, 1 el Serbio, 1 el Israelo kaj 12 el Armenio. Ĉi tie jam komenciĝis serioza laboro. La lecionoj por komencantoj okazis sub gvidado de Araksja (Inna) Elbakjan (Armenio), kiu sukcese paroligis eĉ preskaŭ neparolantajn lernantojn, uzante dum la instruado elementojn de la rekta metodo. La progresiga kurso estis gvidata de Reza Torabi (Irano). Tre interesaj temoj estis elektitaj por la metodika seminario, kiujn prezentis Radojica Petrović. La prelegoj koncernis interkulturan lernadon kaj edukadon. Estis tuŝitaj problemoj de instruado al diversnacia studentaro, protektado de kultura kaj lingva diversecoj. Okazis diskutoj koncerne la problemojn de interkultura komunikado. Samtempa iranlingva tradukado ebligis al la komen-

cantoj el Irano ekhavi la eblon aktive partopreni la diskutojn. Aparta atento estis dediĉita al Esperanto-kulturo kaj celoj kaj rezultoj de Esperanto-instruado. Ĉi-rilate interesajn prelegojn prezentis Reza Torabi (Esperanto-kulturo) kaj Gian Piero Savio (Etna humuro).

La lernejoj ne nur okupiĝis pri serioza lernado, sed ankaŭ povis uzi siajn sciojn en la praktiko, precipe dum la ekskursoj kaj amuzaj vesperoj. La programo kaj vivkondiĉoj dum ISLA-2006 kontribuis al la aktiva interkomunikado de la partoprenantoj kaj helpis ilin pli bone ekkoni unu la alian kiel reprezentantojn de diversaj kulturoj. Gustumado de naciaj manĝaĵoj, aŭskultado de naciaj kantoj, partopreno en tradiciaj ceremonioj, konatiĝo kun naciaj kulturaj valoroj – ĉio tio helpis ne nur kompreni la nacian karakteron kaj la originon de kulturaj diversecoj, sed ankaŭ trovi multon komunan malgraŭ tiuj diversecoj.

Neforgesebla estis la akcepto en la infana ripozejo Gugark. Tio estis bela sur-



prizo ne nur por la alilandaj, sed ankaŭ por armenaj esperantistoj. Ĉiuj por momento forgesis pri sia aĝo kaj revenis en la helan infanecon, kiam ŝajnis, ke la tutan mondon eblas enteni en la manoj... Du tagoj pasigitaj en tiu ripozejo, partopreno en tendaraj aranĝoj, koncertoj kaj dancado por ĉiam restos en la memoro de Lernejanoj. Ĉi tie okazis ankaŭ la Lingva Festivalo, dum kiu Morteza Habibpoor (Irano) en Esperanto, la armena kaj la rusa lingvoj (ĉar en la ripozejo, krom la armenaj, estis ankaŭ rusaj kaj kartvelaj infanoj) prezentis la internacian lingvon kaj instruis kelkajn Esperantajn vortojn kaj frazojn, kiujn ĉiuj infanoj ĥore ripetis. Al la infanoj estis disdonitaj flugfolioj kun informo pri Esperanto. Kvazaŭ tutan semajnon daŭris tiuj du tagoj en Gugark, tiom enhavoriĉaj kaj emociplenaj ili estis! Kaj ili tiom proksimigis la ripozantajn infanojn kaj Lernejanojn, ke larmoj brilis en ĉies okuloj dum la lastaj adiaŭaj ĉirkaŭbrakumoj.

En Gugark kaj poste, jam en Erevan, okazis la ILEI-kunsidoj, dum kiuj estis pridiskutataj la demandoj de disvastigado de ILEI-agado kaj plifortigado de kunlaboro de KAEM en la regiono, organizado de ILEI-sekcio en Armenio. Pluaj laboroj en tiu direkto estos farataj en kunlaboro kun iranaj esperantistoj sub gvidado de Reza Torabi. Vendrede, la 8-an de julio okazis solena akcepto en la Centra Eklubo en la Domo de Amikeco.

Rapide pasis la tagoj de la Internacia Somera Lernejo en Armenio, sed la rezultoj de la farita laboro estas multepromesaj. Ili malfermas novan laborkampon kaj servas kiel forta impulso por iniciati fervoran agadon en la regiono je progreso de la tutmonda Esperantista movado.

Armenia E-Asocio esprimas sinceran dankon al ĉiuj organizantoj kaj partoprenantoj de la ISLA-2006, kiuj esence kontribuis al la sukceso de la aranĝo. Specialan dankon ni esprimas: al s-ro Radojica Petrović pro la subteno de la aranĝo kaj senlaca laboro; al s-ro Reza Torabi pro la aktivigo de la regiona movado kaj preparo de la grundo por la fruktodona kunlaboro; al s-ro Gian Piero Savio pro la aktiva partopreno kaj interesaj prezentadoj; al f-ino Araksja Elbakjan pro la efika instruado.

*nome de la Armenia Esperanto-Asocio –
Karine Arakeljan, Vicprezidantino*

Memoze pri Sergej Bozin...

... Li diris:

– Venigu al mi du knabinojn.

Ni plenumis lian peton.

– Vidu, – li klarigis al unu el ili, – necesas meti la tason sur vian malferman polmon kaj movi ĉi tiun lignan bastoneton laŭlonge de ĝia rando.

– Kaj vi, – li donis al la dua strangan hibridon de kombilo kaj lav-tabulo, – ritme faros ĉi tiel...

Zzzzzum!

La knabinoj serioze aŭskultis lin kaj kapjesis. Ne temis pri ŝercoj. La Majstro

Bozin konfidis al ili tre gravajn taskojn.

Sergej scipovis sonigi ajnan objekton. Iun vintron, reveninte el Tuvio, li portis hejmen tri grandegajn trabojn.

– Kio ĝi estas?! – indigne diris Olga, lia edzino. – Kien ni metos ĉion ĉi?

– Sur la balkanon! – li diris ĝoje.

Kelkajn semajnojn li preparis la trabojn – senŝeligis, purigis, pensis pri taŭga lokado de la traboj. Post la fino de la preparado li kontente montris ilin:

– Aŭdu, kia sono! – kaj per la polmo frapetis la lignon. – Kaj se frapeti kelkajn milimetrojn dekstren – estas jam alia sono! Kaj ĉi tiel – jam tria!

Alian fojon li veturis al Esperanto-renkontiĝo kun Tonja, filino, kaj dumvoje aĉetis tre bonan tamburon. Ĉar la elspezo estis neantaŭvidita, Sergej laŭte anoncis, ke li ne vespermanĝos (kompreneble, tio ne koncernis la filinon). Probable li ŝercis, sed oni ne mirus, se tio evidentiĝus reala. Muziko por li estis super ĉio.

Li ĉiam kunhavis gitaron kaj iun sakon, en kiu troviĝis flutoj, knariloj, diversaj tamburoj, sennomaj (kaj sennombraj) muzikiloj, jen portitaj el folkloraj ekspedicioj, jen manfaritaj. La diversaj aĵoj havis komunan trajton – ili scipovis soni.

Li multe instruis infanojn gitarludi. Ekde la unua leciono li klarigis al ili, kio estas improvizo kaj kiom grava estas pensado en muziko.

Li estis homo, kiu ĉiam rigardis transen. Trans la mondon, trans la homojn, trans la tempon. Por konvinkiĝi sufiĉas rigardi ajnan foton, kie li ne intence pozas, sed estas bildigita dum iu faro – ĉu kantado, ĉu parolado, ĉu simpla silentado.

Li estis unu el malmultegaj homoj inter esperantistoj, kun kiu ni ĉiam ĝojis renkontiĝi – ĉu en Moskvo, en ies hejmo, ĉu en iu tendaro aŭ kongreso. Tre bedaŭrinde, ke ni vidis nin tre malofte, li ne povis ofte vojaĝi el Krasnojarsk en la eŭropan parton de la lando.



Lia forpaso estis sufera. Li piedmarŝis kun siaj lernantoj, ili venis en iun sovaĝan lokon, kie li subite tre malsaniĝis. Bedaŭrinde, oni ne sukcesis savi lin.

Kredu ni, ke Sergej nun sidas ie tre malproksime sur nubo, en ĵinza vesto, kaj kantas ion – por Di', por ni, por si. Lia stel' ĉiam brilos el koro de nokta ĉiel'. Ni ĉiam aŭdos lian kanton.

*Ivan Naumov
Grigorij Arosev
Pavel Korotenko*